

Jean de La Fontaine,  
La cikad' kaj la  
formik'

*tradukita de Manfredo Ra-*  
*tislavo*

Sonis dum somer' kantad'  
De cikad'.  
Kiam venis la jarfin'  
Sen proviz' ĝi trovis sin;  
Ĉar ne estis ie de  
Muš' aŭ verm' pecet', pro  
ve'  
Kaj malsat' ĝi turnis sin  
Al Formik', la najbarin',  
Sin petante pri paner';  
Ĉar grandegis la mizer'.  
“Ĝis la nova kant-sezon'  
Iĝos ja de mi redon'”  
Juris ĝi, “kaj pagos mi  
Interezon ĝis Juni'!”  
La formiko, kiu vere  
Ne prundomon ŝatis tre,  
Diris: “Mi ĝin donos ne!  
Kion faris vi somere?” -  
“La pasantojn per muzik'  
Mi ĝojigis ĝis aŭtun'.”  
“Mi tre ĝojas, dancu nun!”  
Diris tiam la formik’.

...

Jean de La Fontaine,  
Cikado kaj formi-  
ko

*tradukita de Antoni Gra-*  
*bowski*

Kantis dum somer' sen fin'  
Cikadin'.  
Kiam frosta vento blovis  
Sen provizo ŝin ektrovis,  
Sen malgranda eĉ pecet'  
Da mušeto aŭ vermet';  
La malsato pelis ŝin  
Al najbara formikin'.  
Kaj ŝi petis kun insisti:  
“Donu grajnojn por ekzi-  
sto  
Ĝis la nova jar-sezon'.  
Mi vin pagos, laŭ ordon',  
En Aŭgust', pro best-  
honor',  
La procenton kun valor'.”  
Ke ne pekas formikino  
Per pruntemo, estas vere;  
“Kion faris vi somere?”  
Diris ŝi al pruntulino.  
—“Tage, nokte al venantoj,  
Ne mallaŭdu – kantis mi.”  
—“Kantis? – gaja jen meti'!  
Nun ekdancu post la kan-  
toj!”

...

Jean de La Fontaine,  
The Cricket and the Ant

*tradukita de Donald P. Webb*

The cricket had sung her song  
all summer long  
but found her victuals too few  
when the north wind blew.  
Nowhere could she espy  
a single morsel of worm or fly.  
Her neighbor, the ant, might,  
she thought, help her in her plight,  
and she begged her for a little grain  
till summer would come back again.  
“By next August I'll repay both  
Interest and principal; animal's oath.”  
Now, the ant may have a fault or two  
But lending is not something she will do.  
She asked what the cricket did in sum-  
mer.  
“By night and day, to any comer  
I sang whenever I had the chance.”  
“You sang, did you? That's nice. Now  
dance.”

...

*Traduko de la Franca poemo “La Cigale et la Fourmi” de JEAN DE LA FONTAINE (\*1621-07.08 – †1695-04.12) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 1983.*

Arg-549-1105 (2010-07-09 23:08:07)

*Traduko de la Franca poemo “La Cigale et la Fourmi” de JEAN DE LA FONTAINE (\*1621-07.08 – †1695-04.12) en Esperanton de ANTONI GRABOWSKI (\*1857-06-11 – †1921-07-04).*

Arg-549-1108 (2014-03-16 17:39:47)

*Mi, Manfred Retzlaff, trovis tiun ĉi tradukon en [http://wwwbabelmatrix.org/works/frLa\\_Fontaine,\\_Jean\\_de/La\\_cigale\\_et\\_la\\_fourmi/eo/5026-Cikado\\_kaj\\_formiko](http://wwwbabelmatrix.org/works/frLa_Fontaine,_Jean_de/La_cigale_et_la_fourmi/eo/5026-Cikado_kaj_formiko). Ĝi troviĝas ankaŭ en la retejo de la usona esperantisto Don Harlow <http://donh.best.vwh.net>. Pri la tradukinto vidu la vikipedion retejon [http://eo.wikipedia.org/wiki/Antoni\\_Grabowski](http://eo.wikipedia.org/wiki/Antoni_Grabowski). Vidu ankaŭ: [http://eo.wikisource.org/wiki/Cikado\\_kaj\\_formiko](http://eo.wikisource.org/wiki/Cikado_kaj_formiko).*

*Traduko de la Franca poemo “La Cigale et la Fourmi” de JEAN DE LA FONTAINE (\*1621-07.08 – †1695-04.12) en la Anglan de DONALD P. WEBB (\*1939).*

Arg-549-1111 (2010-08-06 19:10:14)

*Mi, Manfred Retzlaff, transprenis tiun ĉi tradukon el la retejo <http://www.bewilderlingstories.com/issue209/cigale.html>. La tradukinto, sero Don Webb, permesis tion mi. - I, Manfred Retzlaff, found this translation in the website <http://www.bewilderlingstories.com/issue209/cigale.html>. The author, Mr. Don Webb, gave me the permission.*